Bolanta Kaldrono

INFORMILO *267 de la*
Esperanto - Grupo Bremen

Septembro - Novembro 2003

Sekr: D-ro Hans Walter Krüger, Dordrechter Str 36, 28259 Bremen, Tel: 0421 561943
Informoj: Prezidanto OstR Hellmut Grebe, Tel: 0421 3963480
Kasistino: Ruth Bohn, Tel: 0421 382715
Red: Dieter Hartig, A.-Hagedorn-Allee 55, 28279 Bremen, Tel: 8476806, HD.Hartig@t-online.de

Vizitu nin en interreto: **www.esperanto.de/bremen**

Dort präsentieren wir unser aktuelles Programm, unsere Zeitung Informilo, die Geschichte unserer Esperanto Vereinigung und die Bremer Stadtmusikanten in Esperanto



Ĉu ankaŭ vi parolas Esperanton?

(Sprichst du auch Esperanto?)

Aŭ – Aŭ

Aŭ – vi serĉas konstante ion novan, ĉar la vivo enuigas vin.
Aŭ – vi ĝuas vian vivon per konstanta novaranĝo.
Ekzemple per Esperanto!

Nia programo:

Je la 20a en nia kunvenejo

La 10an de septembro:	Prelego Franz Kruse Esperanto en interreto
La 15an de oktobro:	"La fino de la individualismo" de M. Migel kaj St. Wahl. Kurt Meyer prezentos la provokan libron kaj gvidos postan diskuton.
La 12an de novembro;	Lingvaj studadoj
La 3an de decembro:	Zamenhoffesto Invitas familio Krüger

Retrospegulo

La 9an de aprilo prelegis Bodo Ehrlich pri la estonteco de la eŭropaj fervojoj. Bodo antaŭokuligis al ni la fervojajn problemojn, kiuj leviĝos en la internaciaj fervojtrafikoj. Temis ne nur pri la administraj, sed ĉefe pri la teknikaj aferoj. Li tuŝis la diversajn kurentsistemojn kaj ankaŭ la diversajn relspurojn.
Ni vidis la malfacilaĵojn en la kunekresko de Eŭropo, kiu pli kaj pli kreskas kaj per tio ankaŭ la problemoj, kies solvoj ne nur estas multegekostaj sed ankaŭ teknike problema.
Estis tre interesa prelego, kiu postlasis pensindan aŭskultantaron.
Dankon pri via interesa prelego, kara Bodo.

Hg

Kvar membroj de nia Grupo kongresis en Dresden

Partoprenis Bodo Ehrlich, Karl–Heinz Marzahn, Lisa kaj Dieter Hartig.
Kulmino por ni estis la ĉefprelego de Bodo, kiu tre bone sukcesis kaj vekis la intereson de pli ol 250 geaŭskultantoj. Similan sukceson travivis Dieter per la iom utopia prelego pri la fervojo en 2100. Precipe estis interesa, ke partoprenis 19 nacioj. El la reago de la diversnaciaj aŭskultantoj mi

povis konstati, ke oni bone komprenis nin. Precipe mi konstatis, ke la rumanioj kaj bulgarioj ege bone prononcis nian lingvon kaj tre bone kapablis ĝin. Mi ankaŭ povis konstati, ke en la menciitaj landoj Esperanto forte kreskas.
La kongreso estis tre interesa kaj multflanka. La fervojfakaj diskutado en la faka kunveno estis tre vigla kaj profunda. La kunsidoj estis bone vizitataj same la kulturaj kunvenoj. La urbvizito tra la historia centro kaj la rondveturo per tramo estis travivaĵo. Sed kongresa kulmino estis la ekskurso al Pillnitz (kastelo kaj rava parko) , la Bastiono kaj la fortikaĵo Königstein. Per
rad-vaporŝipo ni veturis de Königstein hejmen al Dresden.
Samtempe kun la kongreso estis en Dresden Dixiland-tagoj. Estis neimagebla spektaklo. Sur ĉiu angulo ludis grupo da aventure vestitaj muzikistoj kiuj aŭdigis viglegajn melodiojn.
La sekvontaj internaciaj kongresoj okazos en Sopron, Hungario kaj en 2005 en Rumanio. En 2006 ni kongresos en Ĉinio, iu kaj tiu kuraĝos veturi tien per fervojo, — eble. Ni konstatis, ke Esperanto forte vivas!

Hg

Maja Ekskurso la 4an de majo

Posttagmeze ni kunvenis en Osterholz – Scharmbeck antaŭ la muzea vilaĝo.
Hellmut Grebe aranĝis ĉifoje nian ekskurson kaj antaŭzorgis ĉion bonege. En ornitologa ekspozicio oni akceptis kaj gvidis nin tra tre ampleksa prezentaĵo de ĉiuspecaj birdoj. Unue ni aŭdis prelegon pri la diversaj birdomelodioj per birdoorgeno. Ni aŭdis unuopajn birdovoĉojn, sed ankaŭ kelkajn samtempe, estigitaj per butonpremoj.
Por ornitologie interesita homo tiu ekspozicio sendube estas granda travivaĵo.
Poste ni migris al preĝeja kafejo, kie ni trapasis agrablan horeton,
Ĉar ni ĉiuj emis iom marŝi, precipe, ĉar la vetero estis suna kaj agrabla, ni trovis vojon en bela naturo - - kompreneble ni observis la birdojn atente kaj ĝojis pri la birdkantado ankaŭ sen birdoorgeno.
Estis tre interesa kaj agrabla Maja Ekskurso, ni ĉiuj ĝuis ĉiun momenton. Dankon kara Hellmut pro via bonega aranĝo.

Hg

Esperanto en interreto

Por subteni la prelegon de Franz Kruse jen listo de uzataj fakvortoj.

Retpoŝto /e – mail) por sendi elektronikajn mesaĝojn inter individuoj.

TTT – Tut – Tera Teksaĵo (WWW – World Wide Web)
Informpaĝoj (kaj aliaj objektoj) interplektitaj per "hiperligoj".

Novaĵgrupoj (newsgroups, usenet)
por transigi dosierojn de komputilo al komputilo

IRC (Internet Relay Chat) por rekta (skriba) interbabilado.

FTP – File Transfer Protocol por transigi dosierojn de komputilo al komputilo.

Telnet por konektiĝi al fora komputilo.

Adresoj en Interreto

Retpoŝtaj adresoj:

Franz.Kruse@t-online.de
Individuo komputilo

gea@esperanto.de
Bremen@esperanto.de
HD.Hartig@t-online.de

TTT . adresoj:

http://www.esperanto.de/vereine/gruppen.html
protokolo komputilo loko en la komputilo

http://www.bremen.de
http://www.esperanto.de
http://www.esperanto.de/bremen
http://home.t-online.de/home/Franz.Kruse
http://www.whitehouse.gov

Kelkaj serĉrobotoj

Serĉrobotoj estas serviloj, kiuj regule traserĉas la reton por kolekti informojn pri ekzistantaj TTT-paĝoj en interreto. Ili tenas la informojn en datumbankoj kaj permesas al uzantoj serĉi en tiuj datumbankoj.
http://www,Yahoo.com http://www.altavista.com http://www.euroseek.net

Novaĵgrupoj

Novaĵgrupoj estas kvazaŭ mondvastaj informtabuloj, sur kiuj ĉiu povas laŭplaĉe afiŝi kaj respondi al aliaj afiŝoj. Ekzistas pli ol 20.000 grupoj pri plej diversaj temoj.

soc.culture.esperanto , alt.talk.esperanto , soc.religion.bahai ,
rec.arts.movies.international .